

Virinoj en la Esperanto- Movado

Stefan MacGill, oktobro 2023



AMO-seminaro 103 en pola-itala kunlaboro; oktobro 19, 2023.

La seminaria temo: Virinoj, kiuj ŝanĝis la mondon

Pioniraj virinoj

* Klara Zamenhof, 1863-1924

- * Naskiĝis en Kaunas, Litovio kun la nomo Ŝibenik. Ŝi edziniĝis kun Ludoviko Zamenhof, kaj aktive laboris por la lingvo, kiun li kreis. Ili kune havis tri infanojn: Adam, Lidia kaj Zofia. Ŝiaj gepatroj estis bonstataj, kaj Klara sukcesis alportigi sufiĉan monon por eldoni la Unuan Libron de Esperanto, per kiu Zamenhof prezentis sian lingvon al la mondo. Ŝi subtenis la instruan kaj prelegvojaĝan agadojn de la filino Lidia. La foto prezentas ŝin en la 16-a Monda Kongreso de Esperanto; ses monatojn post tio ŝi mortis.



Zamenhof in Vienna in 1924 for the 16th World Esperanto Congress

Pioniraj virinoj:

* Lidia Zamenhof, 1904-1942

- * La filino de Ludoviko Zamenhof bone regis la lingvon kaj vojaĝis vaste por gvidi rektmetodajn kursojn. Entute Lidia gvidis diverslande pli ol 50 kursojn, multe tradukis (ekzemple Quo Vadis) kaj kontribuis al revuoj (ekzemple Literatura Mondo).
- * La nuna verkinto vizitis en 1976 la mezfrancan urbon Thiers por prelegvojaĝi laŭ la tiama skemo de UFE, la landa asocio de UEA. Lidia restis plurajn tagojn en 1938 kun la loka klubo kaj tie gvidis kurson, kiu altiris grandan publikon. La kluba sidejo havas vitrinan ekspozicion pri la restado kaj agado de Lidia. Lidia kvin jaroj post tio pereis en la holokaŭsto.
- * Pri Lidia prelegos Matha Otto en la seminario.



Pioniraj virinoj:

Teru Hasegawa
長谷川テル



- * **Teru Hasegawa (Verda Majo), 1912-1947**
- * Japanino, kiu pioniris en la transnaciaj kontaktoj per Esperanto, en tempo kiam la grandmondaj rilatoj inter landoj fariĝis ĉiam pli streĉaj. Naskiginta en Nara, Japanio, ŝi edziniĝis kun manĉuriano kaj trasloĝis al Ĉinio, kie ŝi agis kontraŭ la japana okupado de Ĉinio kaj aliaj landoj. Ŝi plenumis radioelsendojn direktitaj al japanaj trupoj. Ŝi verkis abunde laŭ ŝia pacisma vidpunkto.
- * Ŝi verkis ankaŭ en Esperanto, sed tiu libro ne plu estas havebla en la libroservo de UEA.



Virinoj de la nuntempo

- * **Claude Nourmont, Luksemburgo:** (1945-2022)
 - * Vic-prezidanto de UEA (2004-2013).
Honora prezidanto de TEJO; redaktoro de *Le Monde de l'espéranto*, dulingva magazino de UFE.
- * **Mirejo Grosjean, Svislando** (1946-)
 - * Prezidanto de ILEI (2013 - 2021)
 - * ILEI de jaroj havas plimulton de virinoj en sia estraro.
 - * Nun 5 el 8 estarantoj estas virinoj.
 - * Gajnis la premion Deguči en Nitra, 2016
 - * Honora Membro de ILEI kaj la Svisa Esperanto-Societo
 - * Havas ampleksajn kontaktojn kun afrikaj esperantistoj



Virinoj de la nuntempo:



- * **Barbara Pietrzak, Pollando (1944-)**
- * Ĝenerala sekretario de UEA (2007-2013).
- * Prizorgadas la Polan Retradion en Esperanto ekde 2011. Akademiano ekde 2011.

Michela Lipari, Italio

1979 2017 komitatano de UEA.
1992 2004 estrarano pri kongresoj,
kulturo kaj landa agado. Dum 7 jaroj
Ĝenerala sekretario.
2015 2020 prezidanto de la Itala
Esperanto-Federacio.



Virinoj de la nuntempo:



* **Renee Triolle, Francio (1943-)**

- * Vic-prezidanto de UEA 1995-1998. Kreinto kun aliaj de JEFO, la junulara organizo de Francio. Ĝenerala sekretario kaj poste prezidanto de UFE. Sekretario de SUK, kiu poste iĝis IKU, la Kongresa Universitato. Teamano por UEA ĉe Unesko en Parizo.



* **Alexandrine Omba, Kongo DR**

- * Instruistino, kiu fondis la klubon EGSR kaj kreis feminisman grupon EVIK kaj organizis la unuan Afrikan Kongreson de Virinoj (AKVo). Aktiva membro de la Afrika Komisiono. Elstara aganto en la kontinento.

Hungaraj herooj

Kvar hungarinoj en eksterlando. Agado en Szombathely kaj István Szerdahelyi en ELTE.

- * **Ilona Koutny, Pollando:** Multjara gvidanto de la Interlingvistika Fakso en la Universitato UAM en Poznano. Pli frue gvidanto de la katedro de Interlingvistiko en la Universitato ELTE.
- * **Katalin Kovats, Nederlando:** Fondinto kaj senlaca prizorganto de la retejo <edukado.net>. Prizorganto de la KER-ekzamenoj.
- * **Zsofia Kóródy, Germanio:** Prizorganto de la Esperanta Urbo en Herzberg, kaj de multaj lernejoj kursoj. Kunorganizas interŝanĝojn de lernantoj kun ĝemelurbo
- * **Monika Molnar, Svislando:** Prizorganto de Esperantaj agadoj en progresema lernejo en La Chaux-de-Fonds.



Virinoj de la nuntempo:

- * **Ursula Grattapaglia, Brazilo**
- * Multjara prizorganto de la bieno kaj lernejo Bona Espero. Agadis ankaŭ favore al Esperanto en la vivo de Rotario.
- * **Aurora Bute, Rumanio**
- * Multjara gvidanto en la rumana movado kun ĉiujaraj kunsidoj en Timisoara. Nun estrarano de UEA kun respondeco pri landa agado, precipe en Eŭropo.
- * **Tereza Kapista, Serbio**
- * Gvidanto de sennombraj rekt-metodajkursoj en multaj landoj.
- *



Fermo de la prezento

- * Certe estas pliaj meritaj kaj menciindaj virinoj.
- * Ofte en la movado ni neglektas la gravan kontribuon de virinoj.
- * Ĉi tiu prezentaĵo provas humile memorigi nin pri tiu grava elemento en nia movada progreso.